Protokolo nro 6/1945

Protokolo pri la 39a jarkunveno de Sveda Esperantofederacio la 19-21 majo 1945 en Stockholm. Partoprenis ĉirkaŭ 160 personoj.

---

§ 1 Sabate la 19 majo la jarkunveno estis malfermata je la 17a horo en la altlernejo. Post komuna kantado de la himno la prezidanto de Grupo Esperantista de Stockholm, Sigvard Håkansson, salutis la kongresanojn.

§ 2 La honora prezidanto de SEF, Paul Nylén, faris paroladon en kiu li i.a. memorigis pri la membroj kiuj dum la pasinta jaro mortis. Post la parolado la partoprenantoj laŭ propono de Einar Dahl faris hurakrion por Nylén.

§ 3 Nylén laŭtlegis la tagordon kiu estis aprobata sen ŝanĝo.

§ 4 Elekto de funkciantoj por la jarkunveno: prezidanto Karl Söderberg, vicprezidanto Einar Dahl, sekretario Sven Alexandersson, vicsekretario Karl Wästfelt, gazetreprezentantoj Teodor Julin kaj la sekretarioj. elektokomitato Emil Falk, Karl Söderberg kaj Einar Dahl, protokol-kontrolantoj Teodor Julin kaj Birger Gerdman, reprezentanto por la

§ 5 jarkunveno de Eldona Societo Esperanto Jan Strömne.

§ 6 Dum la supeo en la ejo de la studentkorpuso Malmgren parolis pri la stato de la tutmonda movado, speciale pri la laboro de IEL kaj la britaj esperantistoj. Li menciis ke li, kiam la paco venis, sendis gratultelegramojn al la dana kaj norvega esperantoasocioj. Al la kongreso venis salutleteroj el rifuĝinta polino en Svedio, el la franca esperantoligo, el finnaj fervojistaj esperantistoj kaj el la esperantogrupo de Karlstad. El la Vendreda Klubo, Kouvola, Finlando, venis telegramo. Eksterlandaj gastoj salutis. nome: Grönborg Danio, sinjorino Taskinen Finlando, Heiersöl Norvegio, Ekstein Aŭstrio. Kübar Estonio. Bartel Germanio. Morariu (Rumanio). kaj Szilagyi (hungaro) por ĉiuj landoj en Eŭropo.

Laŭ propono de Malmgren oni decidis sendi salutojn al ĉiuj atingeblaj esperantoasocioj en eksterlando.

Söderberg proponis monkolektadon por la liberecdonaco al Norvegio kaj la rezulto fariĝis 165 kronoj.

Reprezentantoj de distriktoj kaj grupoj donis mallongajn salutojn.

Diplomoj por fidela membreco estis disdonataj.

Post la supeo okazis danco kaj kantado de Maud Pels kaj Einar Dahl.

§ 7 Dimanĉe la 20 majo oni daŭrigis la traktadojn en la altlernejo je la 10,15 horo. La prezidanto salutis la finnan samideaninon Anna Selonen. Telegramo estis alveninta el Leider, Bofors.

La listo de reprezentantoj estis konfirmataj

§ 8 Oni aprobis sen diskuto la estraran raporton.

§ 9 La revizora raporto estis laŭtlegata kaj aprobata.

§ 10 La jarkunveno donis plenan malŝarĝon al la estraro.

§ 11 Proponoj.

Propono 1. El la distriktoj de Skaraborg, Gotenburgo – Suda Älvsborg kaj Skanio pri plano por la postmilita laboro de SEF kaj starigo de apogorganizo "Amikaro de Esperanto" (vidu aldonon).

En la diskuto partoprenis L Åberg, E Malmgren, P Nylén, E Dahl, C Loman, F Szilagyi, T Morariu, B Beckman, J Strönne, S Håkansson, S Ragnar, R Pehrsson, E Bonander, J Stenström, R Lindahl, T Julin, B Eriksson, S Alexandersson.

En la kritiko pri la propono oni i.a. diris ke lernolibra monopolo ne estas dezirata kaj ke la proponitaj provoj por eksterlandaj prelegantoj estis tro rigore formulitaj.

La kunveno principe aprobis la proponon kaj transdonis al la nova estraro la taskon provi realigi la ideojn en la propono.

La prezidanto salutis la honoran membron urbestro Carl Lindhagen, kaj tiu proponis huraon por "Libereco de ĉiuj popoloj kaj paco de la tuta mondo".

Propono 2. El T Julin pri plivastigo de la garantianta institucio decidita lastjare, popollernejaj kursoj kaj konektoj kun eksterlando (vidu aldonon).

La estraro per cirkulero estis esplorinta la eblecojn por la propono kaj ricevis promesojn pri 28 garantiantoj (60 kronoj/jaro).

En la diskuto partoprenis: S Ahlm, T Julin, R Pehrsson, S Alexandersson, L Åberg, S Håkansson, R Lindahl, C Loman, B Gerdman, J Pihlström, J Strönne, E Malmgren, C Norling, W Johansson, A Svedmark.

La jarkunveno decidis laŭ partproponoj 1, 2 kaj 4. La partproponon 3 oni prokrastis ĝis venonta jaro. Krome oni decidis ke la diversaj proponoj pri monkolektado estu kunordigataj, ke la propono 2 estu subordigata sub la propono 1, ke la antaŭa garantianta institucio eniru en la novan kaj ke la transiro okazu la 1 julio 1945.

Propono 3. El "Mänsklig Gemenskap" ke SEF aktive apogu tiun organizon. L Åberg rimarkigis ke SEF jam apartenas al pacorganizo "Interpopola Kunlaboro". La kunveno decidis ne akcepti la proponon sed eldiris ke unuopaj membroj povas aliĝi al "Mänsklig Gemenskap".

§ 12 Oni decidis ke la kompenso al la estraro estu 400 kronoj dum 1945.

§ 13 Oni decidis ke la kotizoj al la federacio estu la samaj kiel lastjare, do: Kluba membro 5 kronoj kun gazeto, 2 kronoj sen gazeto, rekta membro (kun gazeto) 7,50 kronoj, rekta membro familia 4 kronoj.

§ 14 Oni konfirmis la decidojn pri la sindika fondo, kiuj estis faritaj dum la antaŭa jarkunveno.

§ 15 E Malmgren donis raporton pri IEL kaj transdonis saluton el Goldsmith.

§ 16 E Söderberg raportis pri la Instituto. Dum la vintro okazis kursoj en multaj popollernejoj. Li menciis la novan peton al Radioservo pri esperantoprogramoj kaj ke aŭtune okazos diskuto en la radio pri lingvoinstruado. La Ŝtataj Fervojoj komisiis al la Instituto ellabori praktikan frazaron por ilia bezono.

§ 17 Elekto de federacia estraro:

presidanto Ernfrid Malmgren
vicprezidanto (1 jaro) Jan Strönne
sekretario (1 jaro) Sune Ahlm
vicsekretario Lennart Åberg
kasisto Bengt Skantz
anstataŭanto Sigvard Håkansson

§ 18 Oni reelektis la revizorojn Nils Hedgren kaj Helge Nordkvist kaj la anstataŭantojn Helmi Josefson kaj Teodor Julin.

§ 19 Eva Julin estis elektata estrarmembro de la Instituto kaj Sune Ahlm anstataŭanto.

§ 20 E Dahl faris dankparoladon al la eksiĝinta prezidanto Paul Nylén, kaj granda rozarbusto estis transdonata kiel dankdonacon. Nylén dankis por la honoriĝo.

F Szilagyi anoncis ke li serĉis kunlaborantojn por sia plano pri tradukcentro por valoraj artikoloj.

E Dahl salutis la novan prezidanton E Malmgren kaj transdonis la frapilon al li. Malmgren en parolo promesis unu aferon: laboron. Li dankis la eksiĝintajn sekretarion kaj kasiston por ilia laboro kaj dankis la honoran prezidanton P Nylén kiu post monato fariĝos 75-jara kaj proponis por li hurakrion.

P Nylén esprimis ĝojon ke ankaŭ ĉitiu jarkunveno estis harmonia. Li dankis al la kongreskomitato. La kunveno estis finita je la 17.30 horo.

-o-

En la vespero estis supeo en Margaretaskolan kie oni eldonis numeron de Viva Gazeto sub redaktado de S Ahlm.

Lunde la 21 majo okazis en Valhalla preĝejo esperanta diservo aranĝita de la stokholma grupo de KELI.

La kongreso estis fermita en Skansen, Ravlundagården, kie Sam Owen Jansson parolis pri "La senco de Skansen". E Malmgren dankis al la prezidantoj de la jarkunveno por ilia dejoro.

Sven Alexandersson

Sven Alexandersson
kongresa sekretario